

STARTO

N-ro 3/2005 (216)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

rete Starto: malovec@volny.cz,

rete ĈEA:

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradská@volny.cz (prezidanto)

www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokategorioj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: pedagogia, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

GRAVA INFORMO!!!

NOVA BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poŝtovní spořitelna Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradská@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

Vicprezidanto: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz (zápisy, koncepce, metodika)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříčovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz, libuse.dvorakova@khspee.cz (kluby)

Komitatano: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942; Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec.starto@clavis.cz

Kontrollegis: L. Dvořáková, P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

Gazetara-informa komisiono: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

La 90-a UK en Vilno, Litovio


okazis inter la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005. La 90-a UK estis aranĝita en la 100-a jaro post Bulonjotur-Marco en Litovio, ĉar Zamenhof naskiĝis en la iama teritorio de Litova Granda Duklando, do tiu lando estas unu el la patrujoj de Esperanto.

Venis 2230 kongresanoj el 62 landoj de la tuta mondo por ĝui la internacian kulturon sub la kongresata temo: **Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado**. Salutparolojn sendis Prezidento de Litova Respubliko *Valdas Adamkus*, Ĝenerala Direktoro de Unesko *Koichiro Matsuura*, Vilna urbestro *Arturas Zuokas*, nepo de Majstro *D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof* kaj ambasadoro de Israelo por Litovio kaj Latvio *Gary Koren*. Inter la partoprenantoj estis nia Nobel-premiito Reinhard Selten, kiu prezentis sian novan libron „Por dulingveco en Eŭropo“.

Estis elektitaj novaj Honoraj Membroj de UEA: **Roman Dobrzyński** (Pollando), **Ursula Grattapaglia** (Brazilo), **Heta Kesälä** (Finlando), **Boris Kolker** (Rusio), **Telesforas Lukoševičius** (Litovio), pastro **Duilio Magnani** (Italio), **Stevens Norvell** (Kanado) kaj **Andrzej Pettyn** (Pollando).

Aliĝilon al UEA transdonis landaj asocioj el Niĝerio kaj Irano. Renaskiĝis la Ĵurnalista Asocio, kiu ĉesis ekzisti antaŭ du jaroj. La Litova televido dediĉis al UEA dek minutojn.

La teatraĵo *Kiel mortigi sian edzinon* estis dufoje sukcese prezentita, kvankam aperis ankaŭ kritikoj, ke temis pri kontraŭvirina stultaĵo. Pli sukcesaj estis nacia vespero kaj koncertoj de Bronštejn kaj Handzlik. Dum la kongreso okazis dekoj da fakaj renkontiĝoj de diversaj asocioj. Fine estis akceptita **Vilna deklaro**.



Vicprezidantino de ĈEA Jana Melichárková salutis la kongreson (fone Osmo Buller).

MESAĜO DE UNESKO AL LA 90-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Mi estas tre feliĉa sendi tiun ĉi mesaĝon al la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu decidis tre oportune sian centjariĝon signi kaj simboli pere de interkultura komunikado.

Universala Esperanto-Asocio kaj ĝiaj regionaj asocioj nun havas komune kun Unesko 50 jarojn da fruktodona kunlaborado favore al kultura kaj lingva diverseco. Plie, ekde 1997 tiu NRO havas operaciajn rilatojn kun Unesko, tiel atestante la gravecon, kiun la Organizo donas al tia kunlaborado.

Esperanto, kiel ni scias, estas konstruita lingvo, kiu celas faciligi komunikadon inter homoj kun malsamaj lingvoj ĉie en la mondo. Tiu propono pri interkultura komunikado, malfermita al ĉiuj, estas plene moderna kaj resendas nin al la revo pri internacia konsento, rilate al komuna lingvo, unuiga kaj paca.

Oni nepre devas ĝoji pro via deziro faciligi kaj antaŭenigi, tute konforme kun la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 2001, la valorojn kaj principojn de kultura kaj lingva diverseco.

Efektive, Esperanto, kiu havas universalan kaj internacian celojn, estas unika ilo por kunligi kulturojn

kaj lingvojn. Unesko, siaflanke, zorgas pri tio, ke la kultura riĉeco de la mondo, evidentigita de plureco de identecoj ene de socioj, kiuj mem estas plurecoj, spegulu ĝiam renovigitan dialogan diversecon.

Okaze de la centjariĝo de la Universala Kongreso de Esperanto, mi do invitas la partoprenantojn de la Kongreso labori kun UEA kaj Unesko por antaŭenigi plurismon, el kiu fontos interŝanĝoj kaj kreemo, kiu favoros kulturajn interŝanĝojn, kaj helpos la komunan kunvivadon de homoj kaj de grupoj kun malsamaj kulturaj identecoj.

Mi dankas al la Universala Kongreso de Esperanto, ke ĝi permesis nin kunligi al tiu okazaĵo, kaj mi deziras al vi tre bonan kongreson.

Koichiro Matsuura

Ĝenerala Direktoro de Unesko

Esperantista solidareco kun Afriko

S-ro Mulele S. Mbassa el Tanzanio ricevis pasintjare 482 eŭrojn de japanaj kaj francaj samideanoj, por kio li aĉetis kudromaŝinon, ŝtofojn kaj biciklon kaj nun vivtenas sian familion per produktado de vestoj. Li helpas ankaŭ al aliaj suferantoj el la loka Esperanto-klubo ricevi komencan kapitalon por vivtenado. En Afriko al multaj homoj mankas eĉ plej bazaj bezonaĵoj (loĝado, nutrado, vestado), sen helpo ili ne povas realigi siajn laborajn ideojn. *H.Baker*

VILNA DEKLARO

De la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005 kunvenis la ĝis nun plej granda internacia renkonto okazinta en la litova ĉefurbo Vilno: la 90-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) kun pli ol 2300 homoj el 62 landoj. Ĉiuj laborkunsidoj, prelegoj kaj artaj aranĝoj disvolviĝis en la Internacia Lingvo Esperanto.

La Kongreso okazis cent jarojn post la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Marŝo (1905), kiu markis la eniron de Esperanto en la epokon de parola uzo. La Vilna Kongreso donis tial okazon pensi sub la titolo "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado" pri la tuta sinsekvo de Universalaj Kongresoj.

Tra jardekoj, kiujn karakterizis sociaj ŝanĝoj, politikaj perturboj kaj du teruraj militoj, la Kongresoj konservis sian plej elstaran trajton tiun de forumo por la renkonto de "homoj kun homoj" (kiel formulis Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, en Bulonjo) kun firma volo superi la barojn de nacieco kaj ideologio. Pluraj sesioj de la Vilna UK estis dediĉitaj al la utilo, kiun la Kongresoj alportas al la partoprenantoj. Multaj emfazis la klerigan valoron de UK ne nur por vastigi

sian scion en diversaj fakoj, sed ankaŭ por konsciigi pri la efikoj de interkultura komunikado je plej persona nivelo.

Zamenhof en sia parolado en 1905 celis krei senton de solidareco kaj la konvinkon, ke helpe de Esperanto eblas plibonigi la kunvivadon de homoj en la mondo. Sur tiu tradicio plue apogas sin la UK-oj, kiuj demonstras la daŭran aktualecon de la klopodo faciligi la homaran kunvivadon per la poioma laboro de individuoj kaj pruvas la gravecon de bona volo en la interproksimigo de homoj.

La Vilna UK, kiu okazis en la naskiĝregiono de Esperanto, je vojkruĉiĝo de kulturoj, denove montris, kiom sukcesa estas la unusemajna kunestado de homoj unuigitaj per la lingvo Esperanto kaj komune praktikantaj komunikadon sen antaŭjuĝoj kaj limigoj. La kongresanoj de Vilno firme fidas, ke la centjara historio de Universalaj Kongresoj kiel sukcesa ekzemplo de interkultura komunikado estos daŭrigata, kaj tial alvokas al homoj de simila bona volo lerni Esperanton kaj sperti similan travivaĵon, kiun ĵus donis la Kongreso de Vilno.



REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2005

POEZIO: 1-a premio: **Benoit Philippe** (Germanio) pro la poemserio *Ekvadoro*; 2-a premio: **Neide Barros Rego** (Brazilo) pro *Rajdanto de l' revo*; 3-a premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *Vilna vilanelo*. Partoprenis 31 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

PROZO: 1-a premio: **Leif Nordenstorm** (Svedio), pro *Signoj dum ŝtormo*; 2-a premio: **Sten Johansson** (Svedio), pro *Stranga hobio*; 3-a premio: **Tim Westover** (Usono) pro *Spektaklo*. Partoprenis 34 verkoj de 18 aŭtoroj el 14 landoj.

ESEO: Premio "Luigi Minnaja": **Sten Johansson** (Svedio) pro *Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj*; 2-a premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *Bohemia amoro*; 3-a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

TEATRAĴO: 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: **Marko Nikolic** (Serbio kaj Montenegro) pro *Vuk kaj revolucio*. Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

KANTO: 1-a Premio "An-Song-San pri Kanto": **Enrika Arbib** (Israelo) pro *Balado pri Hamleto*; 2-a premio: **Roy McCoy** (teksto, Nederlando) kaj **Reese Scott** (melodio, Usono) pro *Suna veno*; 3-a premio: **Doron Modan** (Israelo) pro *Eble* kaj **Alejandro Cossavella** (Argentino) pro *La Pordo*. Partoprenis 11 verkoj de 9 aŭtoroj el 6 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 2004: Esperanto-societo **Liberiga Stelo** (Kroatio) pro *Rakontoj sub la lito* de la familio Klobucar: verkita de la patrino Antaneta, ilustrita de la 12-jara filino Ana kaj el la kroata tradukita de la patro Davor. Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

VIDBENDOJ: 1-a premio: ne aljuĝita; 2-a premio: **Jill Gubbins** (Britio) pro *La Duonokulvitro*; 3-a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 3 konkursaĵoj el 3 landoj.

REZULTOJ DE LA ORATORA KONKURSO EN 2005

La Oratora Konkurso por gejunuloj estis relanĉita en la Universala Kongreso en Zagrebo en 2001. En la ĉi-jara konkurso en la UK en Vilno partoprenis tri gejunuloj.

La unuan premion gajnis laborantino de la Esperanta redakcio de Ĉina Radio Internacia, **Wang Fang**, kiu pritraktis la temon *Universalaj Kongresoj de Esperanto: por mi persone, kion ili signifas?*

Aleks Kadar el Francio serĉis en sia parolado respondon al la demando *Eŭropo: ĉu nova potenco, ĉu nova kolonio?* kaj ricevis la duan premion. La tria premio estis aljuĝita al **Natalja Parŝina** el Rusio, kiu parolis pri la sama temo kiel la laŭreatino de la unua premio.



Kiel ni fartis dum la Universala Kongreso en la litova Vilno?

Nia buskaravano, kiun organizis AEH kun E-klubo en Pardubice, veturis nokte tra Pollando. Post 24 horoj ni feliĉe sabate posttagmeze alveturis en Vilnon, admirante ĉe ĉiuj kandelabroj Esperanto-flagetojn kun kongresa emblemo, ankaŭ multajn reklam-rakojn pri la kongreso.



Ni ricevis kongresajn dokumentojn en eleganta plasta aktaĵo, kie troviĝis ankaŭ valoraj libroj pri kongresa urbo, gvidlibro tra Vilno kaj Trakai, kongresa libro, kantareto kaj pluaj interesaĵoj.

Poste ni serĉis nian studentan hejmon, kiu estis inter multaj paneldomoj dekomence nevidebla. Eble ĉiuj estis kontentaj kun la ekipo de la ĉambroj, ĉiam du ejoj havis komunan necesejon. La duŝo kaj la bone ekipita kuirejo kun fridujo kaj frostujo estis en ĉiu etaĝo.

Per nia buso kun du afablaj ŝoforoj ni povis preskaŭ 11 kilometrojn ĉiutage veturi de nia studentejo al kongresejo, antaŭvespere reveturi por revesti nin por koncertoj kaj teatraĵoj kaj post la fino nokte kontente reveni en studentejon.

Kompreneble ni eluzadis nian buson por oftaj ekskursoj. Ĉiam nia gvidanto Josefo informis nin pri vidindaĵoj, ni trarigardis sufiĉe detale ĉefajn memorindaĵojn de Vilno kun vico de multaj preĝejoj. Ni vizitis ankaŭ televidan turon, kiu altis 326,5 metrojn, kun

turniĝanta restoracio.

Promenante tra la dua plej granda litova urbo Kaunas ni vizitis Zamenhof-straton kaj domon de Litova E-Asocio (pli frue domon de Silbernik).

Tie ni vidis ankaŭ muzeon de diabloj, poste Rumŝiŝkés, kie estas skanzeno de la konstruaĵoj de la 18-a jarcento, kastejon Trakai, situantan sur insulo en la mezo de la lago Galve, en la ĉirkaŭaĵo estas 62 lagoj.

La monto de krucoj Ŝiauliai prenis nian grandan admiron. Niaj fotoaparatoj kaj filmkameraoj senhalte notis tiun neforgeseblan lokon kun pli ol 52 mil krucoj sur du malgrandaj altaĵoj.

Kion skribi pri la kongresaj programoj? Multaj prelegoj aŭ kunvenoj okazis samtempe, kaj kiam ni klopodis trovi certan el 17 salonoj, ofte ni ekvidis konaton, kiun ni jam multajn jarojn persone ne renkontis. Multfoje ni hezitis, ĉu prefere viziti interesan prelegon aŭ partopreni ekskurson por ekkoni Litovion.

Ni alportis kelkajn ne dekojn, sed kelkajn centojn da novaj flugfolioj pri AEH, kiuj estis donacitaj al diversaj esperantistoj kaj metitaj sur tablon por senpaga preno. Preskaŭ du horojn ni deĵoris en la giĉeto „faka budo“ (senpage, kiam unu asocio ne venis). Mi preparis pli ol 20 simplajn bildkartojn – nur per kopi-aparato - kun la motivo de Vilno kaj la surskribo „Saluton el la 90-a UK de Esperanto Vilno, Litovio, 23-30 julio 2005“. Ni sendis ilin al niaj plej aktivaj membroj kaj al niaj malsanaj samideanoj (la partoprenintoj de nia buskaravano subskribis ilin).

Margit Turková kaj Jarmila Rýznarová havis preparitajn preleg-kontribuajojn por „Kleriga lundo“, sed estis tiom multe da diskutantoj, ke la gvidanto limigis tempon de parolantoj nur por du minutoj; tie sukcesis M. Turková, en „Faka forumo“ estis ankaŭ mallongigita tempo nur por 5 minutoj, tie sukcesis paroli J. Rýznarová.

La ĉefa kongresejo estis en hotelo Reval, kie praktike okazis ĉiuj kunsidoj dum la kongresa semajno. Alia kongres-

palaco estis je unu kilometro fore de la hotelo Reval, kie en salono Bulonjo por mil personoj okazadis preskaŭ ĉiuj artaj aranĝoj. La tria, sed la plej granda kongresejo proksimume 3 kilometrojn plu de la hotelo Reval estis Siemens Arena, kie okazis solena inaŭguro, internacia arta vespero kaj solena fermo.

Estis multaj prelegoj. Konversacian rondon por progresantoj gvidis s-ano Sylvain Lelarge el Nederlando gaje, eminente mimike per sia tuta korpo. Per siaj longaj fingroj kaj per esprimfortaj okuloj li scipovis teni koncentriĝon de ĉiuj partoprenantoj, kiuj ofte eksplodadis per ridego.

Oratoran konkurson partoprenis nur 3 junaj personoj el Hungario, Ĉinio kaj Rusio. Kvankam la flua parolo de ĉiuj estis eminenta, tamen gramatike mi kaptis sufiĉe da mankoj ĉe la akuzativoj, akcentoj kaj ĉefe ĉe la rusino en molaj silaboj.

Je instigo de gvidantino de regulaj seminarioj en Skokovy Jindra Drahotová mi printempe sendis leteron en la nomo de AEH-estraro al ĉeĥa ambasadoro s-ro Voznica en Litovio kun invito, ke li partoprenu solenan malfermon de la kongreso. Li akceptis la inviton kaj dum la kongreso li invitis grupeton de ok ĉeĥaj esperantistoj en sian ambasadejon. Antaŭe li nenion sciis pri Esperanto. En amika medio ili interparolis pri rilatoj de Litovio kaj Ĉeĥio.

Sabate posttagmeze ni adiaŭis la geamikojn kaj la belegan urbon Vilno. Niaj junaj ŝoforoj bonege gvidis la buson ĝis Pardubice. Ni traveturis entute - kun kelkaj ekskursoj - 3486 kilometrojn.

jary

Miaj impresoj el Vilno

La kongresa temo estis: Cent jaroj de Universalaj Kongresoj. Do tiusence la kongreso estis jubilea - pasis precize cent jaroj de la unua kongreso. Omaĝe al tio, unu salono en la impona kongrespalaco nomiĝis Bulonjo.

Tamen UK mem okazis ĉefe aliloke, en la hotelo Reval. Tie troviĝis multaj ĉambroj kaj giĉetoj, tiom karakterizaj por niaj kongresoj. En la koridoroj konstante svarmis nia esperantista popolo. Kelkaj amasaj programoj okazis en tria loko, nome en la Siemens-Areno, ekz. Inaŭguro, Fermo, Internacia vespero.

Ĝojigis min, ke multaj programoj estis dediĉitaj al mia amata afero - esperantologio. Ne nur la esperantologia konferenco, sed ankaŭ publika kunsido de Akademio de Esperanto kaj aliaj. Omaĝe al UK estis lanĉita nova Esperanta poŝtmarko, kun la temo de la kongreso. Specialan porokazan stampaĵon mi ne sukcesis akiri.

La kongreso ampleksis ankaŭ diversajn kunvenojn de apartaj grupoj laŭ fakoj, interesoj, ideologioj. Mi ĉeestis la kunvenojn de ateistoj (ATEO) kaj de nefumantoj (TADEN), kies entuziasma ano mi estas. El multaj religiaj aranĝoj interesis min kunvenoj de Oomoto, de budhanoj kaj de ŭonbulismo; tiuj religioj estas al mi simpatiaj, ĉar ili neniam murdas siajn kontraŭulojn nek kritikantojn. Ŭonbulismo (relative nova religio el Koreio) interesas min pro lingva motivo: **ŭ** estas uzata antaŭ vokalo kiel konsonanto, dum komence de nia movado oni pensis, ke ĝi povas

nur sekvi vokalon kiel duonvokalo.

Jam kutima kaj tre amuza programero estis la Aŭkcio, kiu iom helpas al nia movado finance. Ĝi estis denove gvidata sprite de Humphrey Tonkin. Ĉi-rilate mi ĝoje konstatis, ke nia Esperantujo havas kelkajn inteligentajn parolantojn kaj oratorojn. Krom la menciita Tonkin temas ekz. pri István Ertl, la eksa redaktoro de nia ĉefa gazeto.

Jiří Rada

Schůze svazového výboru

V sobotu 3. září se konala v Pardubicích 12. schůze výboru ČES. Hlavním tématem jednání byla příprava blížícího se 11. sjezdu ve Vyškově.

Členové výboru převzali odpovědnost za přidělené části programu a materiálové zajištění. Výbor vzal na vědomí zprávu člena volební komise K. Janíka o kandidátech do výboru a revizní komise.

Výbor se rozhodl připravit nabídku Libroserva na internetových stránkách s možností aktualizace.

Dále se členové výboru zabývali možnou spoluprací s mládežnickou organizací ČEJ, prací sekcí a klubů, vztahy s esp. muzeem v České Třebové, změnou tiskárny pro Starto, hospodařením a vnějšími vztahy.

U příležitosti Dne evropských jazyků 26. 9. vyjde v Právu propagační inzerát E. Myosi. K této příležitosti bude také připraven článek o jazycích včetně esperanta, který bude nabídnut tisku.

Jana Melichárková

EK en Ostrava - Vítkovice festas centan datrevenon

En 1905, do ĝuste antaŭ cent jaroj, estis fondita klubo de esperantistoj en Vítkovice, kiu tiam ankoraŭ ne estis parto de la urbo Ostrava. La klubo kunvenadis en Ĉeĥa Domo.

Ni rememoru almenaŭ du el gravaj membroj: Vladimír Slaný, senlaca heroldo de Esperanto en Ostrava, kaj antaŭ nelonge forpasinta Drahomír Kočvara, multjara klubo prezidanto kaj same entuziasma propagandisto de internacia lingvo.

Kune kun esperantistoj el Poruba la klubo festis sian centan datrevenon ĉe s-ano Milan Neuvirth en lia belega haciendo en Krásné pole (Bela Kampo). La aranĝo estis ĉiufanke sukcesa, da manĝoj kaj trinkaĵoj sufiĉe, ankaŭ la vetero sereniĝis, partoprenis ankaŭ la 15-jara klubano el Poruba Michal Drottner, kiu estas viva pruvo, ke la ideo de Zamenhof povas alparoli eĉ la nuntempan junan generacion.

-js-



Ĉu la 71-a aŭ 77-a renkontiĝo de esperantistoj sur Ĉantoryja?

Jam ekde 1929 ĉiam la trian dimanĉon en junio okazas renkontiĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj sur la 1000 m alta supro Ĉantoryja, troviĝanta rekte sur la ĉeĥa-pola landlimo ne malproksime de la silezia urbeto Nýdek.

Diference de la pasinta jaro, kiam la slovakaj esp-istoj estis reprezentitaj per la persono de sia prezidanto mem, ĉijare el Slovakio venis neniu. Sed la vetero estis escepte bona (tiumonate kutime pluvas), tial sur Ĉantoryja kunvenis 15 esperantistoj el Bohemio kaj Moravio kaj ĉirkaŭ 20 partoprenantoj el Pollando frunte kun pola asocia prezidanto Stanislav Mandrak.

En la ĉeĥa turista kabano la memorantoj cerbumis, pri kioma renkontiĝo nun fakte temas. Fine ili akordiĝis, ke plej probable temas pri 77-a datreveno ekde la unua renkontiĝo en 1929, sed nur pri 71-a renkontiĝo, ĉar dum la dua mondmilito la aranĝo ne okazis.

Jaroslav Suchánek



Studofina disertacio

Soňa Horáčková (2005): *Esperanto jako jeden z modelů komunikace v současném světě.* (Esperanto kiel unu el la komunikaj modeloj en la nuntempa mondo.) Plzeň (Pilzeno) (CZ): Okcidentbohemia Universitato, Filozofia Fakultato, studfako Teorio kaj filozofio de komunikado. 81 paĝoj. Magistra disertacio. La studentan aŭtorinon gvidis PhDr. Zbyněk Holub, PhD. el la Pedagogia Fakultato de la Universitato. La disertacia studaĵo estis sukcese defendita la 8-an de junio 2005. El la enhavo: Esperanto kiel viva lingvo - Komparo de Esperanto kun pli novaj projektoj de internacia lingvo - Historio de Esperanto - Esperanta kulturo - Esperanto kiel lingva tipo - Planlingvo Esperanto - Metafizika funkcio de Esperanto. *we*

Eŭgeno Onegin en Esperanto

Eldonejo "Sezonoj" (Kaliningrado, Ruslando) eldonis la versromanon de Aleksandr Puŝkin "Eŭgeno Onegin", kiu laŭ multaj fakuloj estas la plej grava verko en la rusa literaturo. "Eŭgeno Onegin" aperis kiel la 40-a numero en la prestiĝa libroserio "Oriento-Okcidento", en kiu estas eldonataj verkoj aparte gravaj kaj reprezentaj de la nacilingvaj literaturoj de diversaj landoj en la Okcidento kaj Oriento.

Estas feliĉa koincido, ke la libro aperis la 18-an de julio 2005, je la 48-a naskiĝdato de la tradukinto, Valentin Melnikov.

La nova libro de "Sezonoj" estis prezentita en la 90-a Universala Kongreso en Vilno, enkadre de la aŭtora duonhora de Valentin Melnikov la 24-an de julio, je 16h30 en la libroservo.

La libro havas 256 paĝojn inkluzive de la 50-paĝa komentario de Aleksander Korĵenkov. Ĉiun ĉapitron ornamas klasikaj bildoj de Nikolaj Kuzjmin. Oni povas mendi ĝin ĉe UEA kaj aliaj gravaj libroservoj kontraŭ 20 eŭroj. Por grandaj mendoj kontaktu la eldonejon (sezonoj@gazinter.net).

Fragmentoj el la traduko estas rete legeblaj:

<http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/104-lode.htm#104-20>

Esperanto-televideo ekfunkciis!



La 31-an de julio 2005 komencis prova elsendado de Esperanto-televideo en la interreto (<http://internacia.tv/>). La redaktoro de la retejo Ĝangalo Flavio Rebelo tie per kelkaj vortoj klarigas la celon de la projekto kaj la elsendajn planojn. Sur la bildo vi vidas monitoran ekranon, en kies mezo situas ekraneto kun la parolanta Flavio.

Printempa kunveno de mezeŭropaj kvakeroj

Inter la 3-a kaj la 6-a de junio 2005 mi partoprenis en Hungario kunvenon de la Religia Asocio de Geamikoj, kies anoj estas pli konataj kiel kvakeroj. Ĉar en Ĉeĥio kaj la najbaraj landoj ni, kvakeroj, estas treege malmultaj, mi bovenigis la okazon kunveni kaj paroli kun simile pensantaj homoj.

Ĉar vi verŝajne ne scias, kiuj estas kvakeroj, kaj kial la artikolo pri ili aperas en esperantista gazeto, mi mallonge priskribos la movadon kaj klarigos, kion ili havas komunan kun Esperanto.

La komencoj de la Religia Asocio de Geamikoj estas kunligitaj kun la persono de anglo George Fox (1624 - 1691), kiu estis malkontenta kun la stato de eklezioj en sia tempo kaj lando. Precipe ĝenis lin, ke la homoj sekvas diversajn religiajn kutimojn kaj ritarojn, paroladas pri diversaj bibliaj instruoj, sed iliaj koroj kaj ĉiutagaj vivoj estas malproksime de tio, pri kio ili tiel ofte parolas. Post iu tempo li ekkonis, ke nek la ritoj, nek la instruoj faritaj de homoj estas la fonto de la vero kaj la sincera kristana vivo, sed Jesuo Kristo mem. La ekono tiom ĝojigis lin, ke li komencis vojaĝi tra sia lando kaj prediki pri ĝi. Li paroladis pri Dio kiel la interna lumo, kiu povas lumigi ĉiun homon senrespekte de lia socia stato, sekso

aŭ klereco. Kiam pli da homoj aliĝis al li, la ŝtata eklezio vidis danĝeron en ili, ĉar ili minacis ĝian pozicion. Multe da kvakeroj estis arestitaj kaj multaj fuĝis en Amerikon. Fine de la 17-a jarcento William Penn tie fondis kolonion, kiun la angla reĝo nomis laŭ li Pensilvanio. Por kelkaj jardekoj la kolonio vivis laŭ kvakeraj principoj.

Malsimile de la plejmulto de eklezioj, kvakeroj ne havas iujn fiksitajn religiajn instruojn, ĉar la instruisto estas Kristo mem, sed kelke da principoj ili tamen havas.

Kiuj do estas la principoj? Precipe ĝi estas egaleco. Se Dio povas paroli al ĉiu homo, do ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ li kaj devus esti egalaj ankaŭ inter si. Tial, malsimile de aliaj amerikaj kolonioj, en Pensilvanio oni vivis en paco kun indianoj.

La paco estas la dua ĉefa principo de kvakerismo. Se la interna lumo povas lumigi kiun ajn, kvazaŭ iu Dia ero vivus en la homoj. Se ni amas Dion, ni do ne povas mortigi homojn. La kvakeroj do estas pacistoj kaj estas konataj pro siaj porpacaj faroj. En la jaro 1947 ili eĉ ricevis Nobelpremion por paco.

Simpleco estas la tria principo de kvakerismo. Kvakeroj estas aktivaj en plibonigado de la vivo en la mondo kaj ili ne volas preni de tiu mondo pli da aĵoj por si mem, ol estas necese. Sed la simpleco ne tuŝas nur la materiajn aĵojn, sed ankaŭ rilatojn al aliaj homoj, kiujn karakterizas sincereco, kaj ankaŭ iliajn adorkunvenojn.

Kun tio interrilatas la kvara principo, la silento. Tipa kvakera adorkunveno aspektas jene: La kunvenintoj sidas en cirklo silente atendente la Dian alparoladon al iu el ili, kiu poste ekstaras kaj diras la mesaĝon al la aliaj. Kvakeroj havas neniam predikojn, ritojn aŭ pastrojn. La adorkunvenoj normale okazas dimanĉe, sed teorie ĝi povus esti iu ajn tago de la semajno. Por kvakeroj ĉiu tago estas egale sankta, ĉar ĉiutage estas eble (kaj inde) vivi kun Dio kaj lasi lin enflui nian vivon. En Ĉeĥio estas proksimume nur deko da kvakeroj dise loĝantaj en diversaj urboj. Adorkunvenoj estas dufoje en monato en Prago, sed krom ĉi tiuj adorkunvenoj estas ankaŭ la jaraj kunvenoj, kiel estis tiu, pri kiu mi volus skribi.

*

La kunvenoj de mezeŭropaj kvakeroj okazas ĉiujare en Ĉeĥio, Slovakio aŭ Hungario. Ĉijare ĝi okazis en la vilaĝo Taksony proksime de Budapeŝto. La partoprenintoj estis kiel kutime el preskaŭ ĉiuj mezeŭropaj landoj, sed ankaŭ el Britio, Usono, Rumanio, Ukraino kaj Kroatio. Vi povas imagi, kiom da lingvoj tiel kunvenis! Ĉar la kvakera movado havas siajn radikojn en Anglio kaj plej multe da kvakeroj estas en Usono, estas normale, ke la komuna lingvo de komunikado inter kvakeroj estas la angla. La ĉefa temo de la kunveno estis ĉijare hazarde pri la kvakeraj principoj, kiujn mi jam priskribis. Post la enkonduka prelego

oni kutime organizadas pli malgrandajn grupetojn, kiuj estas dividitaj laŭ la lingvoj, kiuj estas plej oportunaj por la grupetanoj, ĉar ne ĉiu majstras la anglan. Ĉijare la grupoj estis la anglolingva, la ruslingva - kaj la esperantlingva. Jes, ĉiujare mi miras, kiel granda nombro da esperantistoj estas inter kvakeroj. Ĉijare troviĝis dek unu samideanoj inter proksimume kvardek partoprenantoj. Post la angla estis por mi vera ripozo paroli kun ili Esperanton. Mi lernis la anglan ok jarojn kaj mi scipovas legi anglajn librojn, sed mia problemoj, kaj mi pensas, ke ne nur mia, estis, ke mi ne komprenis bone la denaskajn parolantojn. Ne estas por mi problemoj paroli la anglan ekzemple kun hungaro aŭ ruso, sed la angla parolata de britoj estas io tute alia. Al tio alvenas ankaŭ la problemoj, ke britoj ĝenerale ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn, do ili ne kapablas imagi, kion signifas por fremdulo trakti fremdlingve. Mi tre aprezis la fakton, ke Esperanto apartenas al neniun nacio, kaj ke inter ni ne estis denaskaj Eparolantoj, do ĉiuj havis proksimume la samajn ŝancojn enviciĝi en la diskuton.

Interalie estis interese paroli kun unu hungara kvakerino, kiu rakontis, ke ŝi profesie instruas Esperanton. Tio mirigis min kaj eĉ pli mi miris, kiam ŝi eksplikis, ke en Hungario oni havas leĝon, ke ĉiu studanto de universitato devas ekzameniĝi el du fremdaj lingvoj, sed la leĝo ne specifas, el kiuj.

Do multaj studentoj elektas Esperanton, ĉar ĝi reprezentas por ili malplej da laboro. La leĝo estas plenumita, la studentoj estas kontentaj kaj mi pensas, ke la samideanino ankaŭ ne plendas. Senkonsidere de tio, ke la plejparto de la studentoj ne plu okupiĝas pri Esperanto post la ekzameno, mi pensas, ke iu kono de Esperanto devas resti en ili. Do eble, se vi renkontos ie iun hungaron, kiu studis en universitato, provu, ĉu li ne komprenas Esperanton, ĝi estas relative verŝajna.

Eble ankaŭ vi demandas, kiel eblas, ke inter tiel malgranda grupo da homoj povas troviĝi tiom da esperantistoj dum tute neesperantista okazaĵo. Ĉu ankaŭ al vi ŝajnas, ke ĝi ne povas esti hazardo? Mi komparas la kvakerajn principojn kun la Esperantaj, precipe la pacon kaj egalecon, kaj venas en mian kapon, ke la kialo estas ĉi tie. Ĉu ankaŭ al vi ŝajnas, ke la du movadoj estas preskaŭ gefratoj?

(Se vi deziras pluan informon, iru al: pavel.marusinec@cuzk.cz)

La 38-a ILEI-Konferenco

okazis en la urbo Kaunas (Litovio) inter la 30-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2005. Aliĝis 60 personoj el 25 landoj. La konferenca temo estis „Interkultura Komunikado en edukado“ kaj ĝi estis traktita dum aparta simpozio organizita meze de la konferenca semajno de diversaj specialistoj pri la temo.

La simpozio okazis kunlabore kun

Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato, ĝi estis dulingva (angla kaj Esperanto) kun samtempa interpretado kaj estis malfermita al la ĝenerala publiko.

La programon riĉigis la kontribuoj de diversaj kolegoj pri 'Projekto Bixad' (Mihai Trifoi), 'Esperanto-instruado en Litovio' (Vera Valentaite), 'Kulturo de Esperanto' (Ron Glossop), 'Kiel sukcesigi E-kursojn' (Julián Hernández), ktp. Certe interesoplena estis kvizo proponata de Josef Šemer el Israelo. Gravan lokon okupis la Lingva Festivalo. Ĝi okazis en la ĉefstrato en la urbocentro de Kaunas kaj estis prezentitaj lingvoj kiel la japana, la franca, la angla, la hispana, Esperanto, ktp. Por la malfermo kaj fermo de la Festivalo estis uzita speciale konstruita podio, kio ankoraŭ pli videbligis nian aranĝon.

Dum la ekskursita parto de la Konferenco eblis konatiĝi kun la urbo Kaunas mem, la verkoj de la fama pentristo Ciurlionis, la muzeo de popola vivmaniero kaj la parko de Aukštaitija. La komitato kunsidis dum 4 horoj. Ĉeestis reprezentantoj el Aŭstralio, Britio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio (KEU), Kubo, Nederlando, Pollando, Rumanio, Ukrainio kaj Usono. La ĉefaj decidoj de la komitato estis la jenaj:

- elekto de Aida CIZIKAITE kiel estrarano
- aprobo de provizora buĝeto por la jaro 2006
- refondo de la Lerneja Komisiono
- akcepto de Reprezentanto por Hispanio
- starigo de Scienca Komitato por IPR

*Atilio ORELLANA ROJAS
Sekretario*

Esperanto-tago en Lanškroun 2005



La 18-an de junio 2005 la Esperanto-klubo en Lanškroun aranĝis renkontiĝon en Horní Čermná. Antaŭtagmeze ni trarigardis la kalvarion sur Mariánská Hora (Maria-Monto). Dum la renkontiĝo ni festis ankaŭ naskiĝtagon de du membrinoj de la organizanta klubo. Sur Mariánská Hora ili akceptis gratulojn al la vivjubileo kaj donacojn.



Tra pentrinda pejzaĝo ni iris ĝis Horní Čermná. La ĉefa posttagmeza programo realiĝis en agrabla medio ĉe la familia

domo de samideanino Jarka Šilarová. La jubileulinoj preparis por la gastoj riĉan regalon. Ĉio okazis en amika babilado kaj amuzado. Tombolo ne mankis.

-ld-

Nezapomeňte se přihlásit na sjezd ČES ve Vyškově!!

Ve dnech 21.-23. října 2005 se uskuteční sjezd ČES ve Vyškově. Omlouváme se, ale městská rada neschválila přejmenování stezky Klementa Gottwalda na stezku Esperanto. Namísto této akce bude na programu návštěva Městského muzea a návštěva Městské knihovny, která je po rekonstrukci a byla vyhlášena za stavbu roku Jihomoravského kraje. Dále je možno navštívit Zoopark a Aquapark (tobogan, skluzavka, vířivka, divoká řeka, **cena:** den 80 Kč, děti do 15 let 60 Kč, děti do 6 let 20 Kč). Nezapomeňte si plavky! Každý účastník získá bohaté propagační materiály města včetně mapky a literaturu z knihovny ČES. Tombolu tvoří sponzorské dary, ale i vaše příspěvky do tomboly jsou vítány. Těšíme se na vás. Přihláška byla v minulém čísle, lze si o ni napsat ing. L. Dvořákové.

Konkurso pri informado

La Afrika Komisiono de UEA proklamas konkurson pri informado, kiun povas partopreni artikoloj pri nia movado aperintaj en naciaj gazetoj (aldonu E-lingvan tradukon). 15.3.2006 la juĝkomisiono anoncos, kiu ricevos premiojn. Adreso: Afrika Oficejo (11 BP 48, Lome, TOGO, Fakso : (228) 227 51 64, E-poŝto: afrika.oficejo@uea.org)

PRVNÍ VALNÁ HROMADA ČESKÉ ESPERANTSKÉ MLÁDEŽE

Marek Blahuš

V sobotu dne **18. června 2005** se uskutečnila v turistické chatě *Ranczo* na polské straně vrcholu hory **Velká Čantoryje** ve Slezských Beskydech, při příležitosti tradičního mezinárodního setkání esperantistů, první, ustavující Valná hromada občanského sdružení Česká esperantská mládež (ČEJ). Zúčastnilo se jí 5 členů ČEJ a 3 hosté (2 z Polska, 1 z České republiky).

Na začátku přednesla předsedkyně Přípravného výboru, Dagmar Chvátalová, krátkou **uvítací řeč**, kterou přivítala účastníky Valné hromady, poděkovala jim za aktivní zájem o činnost sdružení a mladých českých esperantistů obecně a vyjádřila naději, že ustavované občanské sdružení bude svou činností úspěšně naplňovat cíle, které si stanovilo ve svých stanovách, a obecně přispěje k oživení mládežnického esperantského hnutí v ČR.

Dáša Chvátalová poté přednesla **Výroční zprávu** ČEJ za období od 30.1.2005 do 18.6.2005. Zpráva informovala o historii českého mládežnického esperantského hnutí, popisovala příčiny dřívějšího rozpadu jeho organizované formy i nedávného

rozhodnutí znovu jej zorganizovat pod hlavičkou občanského sdružení a informovala o tom, jak probíhalo jeho zakládání a jakých výsledků se během té doby podařilo Přípravnému výboru dosáhnout. Poté byly předneseny **krátké zprávy o činnosti jednotlivých členů Přípravného výboru**, následované diskuzí k předneseným zprávám a hlasováním o jejich schválení.

Dalším bodem programu bylo **představení zahraničních hostů**. Jako první se představil Adam Wilkus z Polska, který pozdravil přítomné účastníky a vzpomněl, jak se esperantistou stal po objevení staré učebnice esperanta, která kdysi patřila jeho dědečkovi, který za druhé světové války působil v polské armádě jako strážce skupiny zajatých francouzských vojáků, se kterými se pokoušel prostřednictvím Esperanta komunikovat. Na tento zajímavý příběh navázal druhý host ze zahraničí, a to také z Polska, Piotr Nosek, který vzpomněl, že se o esperanto začal zajímat už v mládí, ale až po čase se stal pomocníkem polské sekce organizace ILEI, jejíž zasedání v Polsku se pro něj stalo jeho prvním mezinárodním esperantským setkáním.

Program schůze Valné hromady dále pokračoval **volbou členů volených orgánů** pro následující volební období. Voleni byli 3 členové Výboru a 2 členové Revizní komise. Zvoleni byli následující kandidáti:

Výbor

Předsedkyně: Dagmar Chvátalová

Místopředseda: Marek Blahuš

Pokladník: Avinty Lanaikey

Revizní komise

Člen revizní komise: Tomáš Břicháček

Člen revizní komise: Daniel Mrázek

Následovalo projednání **Plánu činnosti** ĈEJ pro následující období, jehož návrh přednesl Marek Blahuš. V následující diskuzi k představenému plánu činnosti zaujal účastníky Valné hromady nejvíce bod, ve kterém si sdružení definuje za cíl podporovat roli esperanta jakožto nástroje pro potírání xenofobie, a dále bod, v němž se klade cíl spolupracovat s organizátory mezinárodního kongresu mládeže IJK konaného v roce 2005 v Polsku, a to např. zajištěním promítání filmů s esperantskými titulky během konání kongresu. Navrhnutý Plán činnosti byl nakonec **schválen** počtem hlasů 5 pro, 0 proti a 0 zdržení se.

Program Valné hromady byl ukončen živou **diskuzí**, která by zřejmě mohla probíhat velmi dlouhou dobu až do pozdních nočních hodin, nebýt fyzického vyčerpání většiny účastníků. Na počátku diskuze poblahopřál Adam Wilkus někdejšímu Přípravnému výboru i nově zvolenému Výboru ĈEJ a ocenil jejich snahy o obnovení organizovaného hnutí české esperantské mládeže. Upozornil účastníky také na

to, že kromě letošního IJK se v Polsku pravidelně konávají další velká setkání esperantistů, např. HELA koncem května u Baltského moře či Artaj konfrontoj v Poznani, a vyzval k účasti na těchto setkáních i členy České esperantské mládeže. Poté Adam Wilkus ještě představil svou ideu propagace esperanta prostřednictvím plakátů vylepovaných v ulicích obcí či prostřednictvím nápisů umístěných v prostranství pod mosty, kudy pravidelně prochází hodně lidí. V reakci na tento příspěvek oponoval Petr Adam Dohnálek dotazem, zda taková věc může reálně fungovat, a Adam Wilkus v odpovědi dodal, že myšlenka propagace esperanta nápisy na mostech již byla v Polsku na některých místech úspěšně uskutečněna a že takováto reklama může lidi zaujmout a vzbudit v nich zájem dozvědět se o esperantu víc. Nakonec ještě vzpomněl dobré zkušenosti vlastní a svých přátel s esperantem, kteří se přesvědčili o možnostech praktického využití esperanta např. při návštěvách Indie či Íránu, kde se např. esperanto ukázalo jako jediný jazyk, kterým se byla skupina českých turistů schopna domluvit se zastupujícím úředníkem neznajícím angličtiny ani jiného významného národního jazyka.

Stránky naší mládeže na internetu:

<http://www.esperanto.cz/cej/>

<http://groups.yahoo.com/group/cxej-aktivuloj/>

ESTIĜAS PRAGA KLUBO DE ĈEJ

Tomáš Břicháček

Kvar monatojn post la renovigo de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo estiĝos ĝia unua klubo – en Prago. Oni ĵus preparas la unuan kunvenon, kiu okazos fine de septembro.

La klubo poste kunvenos dufoje monate en iu restoracio. Ĝi funkcios kiel certa malfermita esperantlingva diskuta forumo, kie la malpli spertaj klubanoj perfektigos siajn lingvajn sciojn kaj kie oni instruos la novajn interesatojn. La klubo tiel estas certa instituciigita daŭrigo de la sukcesa kurso Esperanto ĉe biero.

Vi baldaŭ povos viziti la retpaĝon de la nova klubo www.esperanto-cz.net/prago.htm, kie vi ekscios la novaĵojn.



Ĉina Radio Internacia

eldonas gazeton **Mikrofone**, en kies 10-a numero (aprilo-junio 2005) aperis artikolo de Jiří Patera pri **Petr Ginz** kaj gratulo al ora geedziĝo de **Adolf Houda** kaj **Peva Houdová** el Příbram, kiuj regule aŭskultas la radion.

Korespondi deziras

Mi estas 32-jara esperantisto el DR Kongo, sed nuntempe mi loĝas en NYARUGUSU, rifuĝejo en Tanzanio, kaj estras Kristanan Eklezion landskale (EMD/DR Kongo). Per ĉi tiu letero mi petas vin kontaktigi min kun Verd-stelanoj por sincera kaj longdaŭra korespondado.

Past. BUKURU R. NABAHENA. (Mia UEA-Kodo:buna-b)
nabahenabubu@yahoo.fr

Koupě

Tuzemské staré esp. zpravodaje Tagiĝo, Fajrero, Verda Voĉo, Hradecano, Esperanto (Hradec Králové) hledá a odkoupí Mgr. Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno 2.

Kio estas MAS?

MAS estas Monda Asembleo, tutmonda organizo de ĉiuj homoj, kiuj ne nur konvinkiĝis, ke pli bona mondo eblas, sed kiuj pretas kune diskuti kaj agi por realigi ĝin.

Ĝi laboras ekskluzive per retroŝto, ne postulas membrotizon, estas sen piramidecaj strukturoj - ne havas estraron nek prezidanton nek konfliktkomisionon ktp., do, ĉiuj membroj decidas rekte mem, laŭ la principoj de rekta demokratio.

Rigardu en ĝian retpaĝon:
<http://mas-eo.org>

**LINGVOPOLITIKAJ ASPEKTOJ
DE LA PLIVASTIĜO
DE EŬROPA UNIO**

Inter la multaj demandoj levitaj de la plimultigo de la membraro de la Eŭropa Unio estas la demando pri lingvoj. Kvan- kam la Traktato de Romo antaŭvidis egalecon de statuso por la naciaj lingvoj en la institucioj de EU, konsiderinde altiĝis la baroj al efektivigo de tiu principo, en la nuna situacio de 25 ŝtatoj-membroj kun 21 oficialaj lingvoj, pli ol 25 regionaj kaj minoritataj lingvoj, kaj multaj iom grandaj enmigrintaj lingvokomunumoj, ĉiuj kun tre diversaj nombroj de parolantoj. Sen atenta, sistema, kaj bone financata aliro al mastrumo de la multlingva karaktero de EU, la lingvoj kaj kulturaj valoroj de iuj el la pli malgrandaj ŝtatoj kaj neŝtataj lingvogrupoj povus estis minacataj, kun sekva kompromito de la principo de egaleco inter EU-membroj kaj malfermiĝo al novaj specoj de konflikto kaj lukto en kaj inter nacioj.

Tiu situacio estis fokuso de la Kvara Nitobe-Simpozio, organizita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj en kunlaboro kun la Komitato pri Eŭropaj Aferoj de la Litova Parlamento, la Akademio de Sciencoj de Litovio, kaj la Universitato de Vilno. Pli ol 70 partoprenantoj el pli ol 20 landoj, inkluzive de naŭ novaj ŝtatoj-membroj de EU, kunvenis por esplori la diversajn politikajn alternativojn kaj serĉi unuanimecon pri kelkaj bazaj rekomendoj pri la lingvopolitiko de EU sub la novaj kondiĉoj.

Zorgoj

La simpozianoj komune esprimis fortan apogon al la procezo de eŭropa integriĝo, kaj precipe al la streboj disvolvi justan, demokratian kaj altkvalitan komunikadon inter ĉiuj eŭropanoj. Ili ankaŭ dividis la kredon, ke la aktuala lingvopolitiko de EU, aŭ en la EU-institucioj mem, aŭ je la nivelo de naciaj registaroj, estas neadekvata por atingi tiujn celojn. La jenaj problemaj evoluoj ŝajnas larĝe disvastigitaj tra EU:

- * Neglekto de lingvaj demandoj en la politika decidofarado sur terenoj kiel ekzemple supera edukado, sciencaj esploroj kaj amaskomunikiloj, kun negativa efiko je la valoroj kaj bezonoj de malgrandaj naciaj kaj nenaciaj lingvokomunumoj;

- * Tolerado aŭ kultivo de normoj de lingva praktiko, kiuj kontraŭas la principojn de multlingvismo kaj lingva egaleco, ofte estigante situaciojn, en kiuj homoj kun limigita aŭ nenia rego de la angla lingvo ne povas partopreni egalece en la politika decidoprocezo en EU.

- * Troa dependo je ekzistantaj lingvorilataj institucioj kaj ideoj, kiujn oni ne evoluigis por alfronti demandojn en eŭropa aŭ tutmonda kunteksto - tendenco, kiu refortigas persistan mankon de lingvaj konscio kaj faka kono en registaroj je ĉiuj niveloj.

- * Rimarkinda redukto de la instruado de lingvoj aliaj ol la angla, malpliigante la ŝancojn, ke eŭropanoj akiros profundajn komprenon kaj estimon de la kulturoj de najbaraj landoj, kaj refortigante eksterproportcian ĉeeston de britaj kaj usonaj kulturaj produktoj tra EU;

* Evito de malferma publika diskutado de lingvopolitiko, kaj precipe de realecaj alternativoj al la nuna situacio de oficiala, sed dubkvalita multlingvismo ligita al la nereguligita kaj neegaleca disvastiĝo de la angla.

En la kunteksto de la 25-membra Eŭropa Unio, simpozianoj opiniis, ke tiuj lingvopolitikaj malfortoj tendencas subfosi la lingvojn de la pli malgrandaj ŝtatoj. Simpoziaj prelegantoj atentigis pri la ekzisto de signifaj ekonomiaj kaj politikaj ŝarĝoj truditaj de la nuna sistemo al la parolantoj de tiuj lingvoj, kaj ili esprimis timon, ke tio longperspektive kondukos al la perdo de statuso kaj vivanteco de ĉiuj lingvoj escepte de la plej grandaj.

Agaddirektoj

Kvankam ili pledas por vasta gamo de ideoj kaj prioritatoj en la traktado de tiuj problemoj, partoprenantoj de la simpozio interkonsentis pri la sekvaj kvin ĉefaj agaddirektoj:

1. Komuna kadro. Oni bezonas konstrueman, realisman lingvopolitikan kadron por la Eŭropa Unio de 25 landoj, kiu ekvilibrigu protektadon kaj aprezadon de lingva diverseco kun la bezono de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU. Partopreno de larĝa gamo de individuoj kaj institucioj, reprezentantaj multajn diversajn perspektivojn kaj interesojn, estos nepre necesa por realigi tian vizion.

2. Publika kaj politika debato. Por estiĝi la bezonatan politikan volon subtene al tia komuna kadro, necesas multe pli da klopodoj altigi la nivelon kaj intensecon de la prilingvaj debatoj publikaj

kaj politikaj. La malavantaĝoj de la nuna sistemo, la investitaj intereso, kiuj subtenas ĝin, kaj aro da pozitivaj politikaj alternativoj bezonas vortumadon en manieroj, kiuj ebligas diskutadon inter ordinaraj homoj, raportadon fare de ĵurnalistoj, kaj konkretajn elpaŝojn flanke de elektitaj deputitoj. Gravas disvolvi longdaŭrajn politikajn interesgrupojn kaj koaliciojn por alstrebi lingvan egalecon, diversecon, kaj vivipovon.

3. Diversaj solvoj. En la evoluigo de komuna lingvopolitika kadro necesas atenti almenaŭ jenajn kvin agadkampojn, el kiuj ĉiu povus postuli malsaman kombinon de solvoj kaj iom malsaman politikan strategion:

* internan kaj profesionan komunikadon de EU-institucioj, kio intime ligiĝas al la profesia kulturo kaj la memregado de la institucioj mem;

* oficialan komunikadon de EU-institucioj kun civitanoj kaj registaroj, kion reguligas la politikoprocedo de EU inkluzive de ŝtatoj-membroj, la Konsilio de Ministroj, kaj Eŭropa Komisiono, ktp.;

* mastrumon de la lingva situacio de la ŝtatoj-membroj de EU, kio estas sub jurisdikcio de naciaj parlamentoj kaj fine respondas al la demokrata procedo;

* mastrumon de komunikado kaj kulturaj rilatoj, interne de EU, flanke de grandega gamo de publikaj, profesiaj, komercaj, neregistaraj kaj privataj organizaĵoj kaj institucioj, kies lingvopolitikoj estas plejparte memstaraj sed ofte forte limigitaj de ekonomiaj kaj politikaj faktoroj;

* eksteran komunikadon de EU-institucioj kaj ŝtatoj-membroj kun ne-eŭropaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, kio estas influata de kuntekstoj same tutmondaj kiel lokaj, kaj siavice povas havi implicojn por politikaj decidoj ene de EU mem.

4. Alternativaj vizioj. La evoluigo de komuna kadro kaj de politikaj solvoj en difinitaj kuntekstoj profitos al informita publika debatado pri konkurencaj vizioj de la lingva estonteco de la Eŭropa Unio. Inter la vizioj atendantaj formuladon kaj ellaboron estas la jenaj:

* Vizioj, kiuj tiras konkludojn el diversaj modeloj de multilingvismo tra la mondo por pli bone kompreni la dinamikon kaj potencialajn fortojn kaj malfortojn de la EU-lingvosistemo, kaj ĝia loko ene de tutmonda lingvosistemo.

* Vizioj, kiuj difinas kaj defendas la statuson kaj bezonojn de malgrandaj naciaj kaj ne-naciaj lingvokomunumoj, kaj indiĝenaj kaj enmigraj, ene de EU.

* Vizioj, kiuj disvolvas politikajn rimedojn por certigi, ke iu ajn vaste uzata interlingvo ne subfosu la pluvivipovon de la naciaj lingvoj, la egalecan traktadon de ties parolantoj en EU-institucioj, kaj la konservadon de kultura diverseco.

* Vizioj, kiuj esploras la potencialan rolon de Esperanto ene de komuna lingvokadro de EU, precipe en rilato al ĝiaj ekonomiaj avantaĝoj kiel pivota lingvo en tradukado kaj interpretado, ĝia efikeco kiel enkonduko al lingvolernado, kaj ĝiaj meritoj sur la kampo de interkultura komunikado.

* Vizioj, kiuj projekcias la estontan disvolviĝon de lingva kaj komunika teknologio, kaj de novaj sistemoj de fremd-

lingva edukado, kaj iliajn potencialajn sekvojn en lingvo-lernado kaj -uzado.

5. Politika kaj fakula kunlaboro. La Kvara Nitobe-Simpozio konsistigis unu el la unuaj okazoj, kie politikistoj kaj fakuloj el plimulto de la ŝtatoj de la pligrandigita EU povis diskuti komunajn zorgojn kaj prioritatojn sur la tereno de lingvopolitiko kaj komunikado. Progreso pri la demandoj skizitaj ĉi tie dependos de plua kaj plivastiĝanta kunlaboro de ĉi tiu speco, inkluzive de:

* Regulaj kunvenoj, kaj je EU-nivelo, kaj inter diversaj ŝtataj grupigoj, ekzemple en la formo de lingvopolitika konferenco por la malpli grandaj EU-ŝtatoj, kiel oni proponis dum la Simpozio;

* Disvolvo de reto por sciencaj esploroj, kiu kunligas esploristojn pri la ekonomiko, sociologio, politiko, kaj planado de lingvoj (inkluzive i.a. de edukaj, terminologiaj, kaj juraj aspektoj) kaj kiu kapablas provizi rapidajn kaj bone dokumentitajn informojn al decidofarantoj kaj al ĵurnalistoj;

* Daŭra komunikado per retoj kaj aliaj rimedoj, kun la celo engaĝi kreskantan nombron de ŝlosilaj individuoj en la akademias, burokrataj kaj politikaj medioj de la EU-ŝtatoj por la evoluigo de komunaj solvoj al komunaj lingvaj problemoj.

* La evoluo de EU en kompleksan, novspecan formon de internacia kunlaboro postulas novajn alirojn al la mastrumado de multlingvismo kaj de efika, egaleca komunikado. La disvolvo de kapabloj sur ĉi tiu tereno, en la formo de novaj ideoj, fakaj kompetentoj, kaj institucioj, estas urĝa prioritato, kiu meritas atenton kaj rimedojn de la naciaj registaroj same kiel de la EU-instancoj.

TURISMA RENKONTIĜO EN PLASY KVARAN FOJON

Pilzenaj esperantistoj sukcesis de-nove okazigi bonan, jam la 4-an TREP. De la 9-a ĝis la 12-a de junio 2005 venis preskaŭ dudek gesamideanoj, inter ili ankaŭ amiko Claude el Francio, pasigi agrablajn tagojn en ripozcentro MAJ.

Ĉijare la urbo festas 860 jarojn de sia ekzisto, fakte en jaroj 1144-1145 estis tie fondita cisterciana monaĥejo, ĉe kiu iama vilaĝo estiĝis. Tial la TREP-anojn venis persone saluti la urbestro kaj transdonis al ili propagandajn materialojn pri la urbo (eĉ ankaŭ glasojn kun surskribo pri la datreveno kaj blazono).



Ĵaŭde vespere la ĉeestantoj interkonatiĝis kaj s-ano Sládeček prezentis lumbildojn pri siaj lasta-

tempaj travivaĵoj.

Vendrede antaŭtagmeze ni promenis al Plasy kaj vizitis memorĉambron (eble venontan muzeon), dediĉitan al iama loka ferprodukt-ejo. Kanceliero K. L. Metternich, posedinto de ĉi tieaj kastelo kaj latifundio, fondis ĝin en la 1-a kvarono de la 19-a jarcento. Kvankam la fabriko funkciis eble nur 50 jarojn, ĝi produktis vastan sortimenton kaj signifan nombron da diversaj produktoj. Famaj estas ĉefe ĉiuspecaj gisaĵoj por ĉiuj labor-aplikoj inkluzive de ornamaj. Antaŭ la objekto de la iama entrepreno staras ekzemple renovigita statuo de sanktulo, en ĉiuj lokoj de la regiono eblas trovi tombejajn elementojn ktp.

Posttagmeze ni per trajno veturis al Horní Bříza, kie troviĝas muzeo de tiea ceramikfabriko *Západo-české kaolinové a keramické závody*, kiu tre bone informas pri historio, tradicioj kaj nuntempa produktado, de la fondo (en 1882 fare de J. Fitz) ĝis hodiaŭ. Multspecaj estas ĉefe kaolinaj ceramikaĵoj, interesaj ekzempleroj de jam finita ŝamot-fabrikado. La gvidistino tra la ekspozicioj post fino de trarigardo donacis al ĉiu el gastoj kahelon kun bildo de malnova fabriko. Ŝi eĉ rifuzis akcepti de ni monon por vizito de la muzeo!

Vespere rakontis s-ano Helme-
czyová pri sia partopreno de la
ĉijara IFEF-kongreso maje en la
rumana urbo Brašov. Sekvis video-
filmoj pri Nordpilzena regiono,
vidindaĵoj de Pilzeno kaj ĝia
ĉirkaŭaĵo, pri la 100-jara jubileo de
la elektrofervoja linio Tábor-Be-
chyně, okazinta pasintjare.

Sabate ni ekskursis per aŭtobuseto
en okcidentan parton de la pilzena
regiono. Unue en Konstantinovy
Lázně ni ĝuis kafon kaj dolĉaĵojn
en kafejo de sanatorio Prusík,
promenis tra belega parko kaj antaŭ
unu fontpavilono ni faris komunajn
fotojn. La lokaj kuracfontoj,
konataj jam de la 16-a jarcento,
estas ekspluatataj de la jaro 1806,
kiam la posedanto de feŭdobieno
Bezručice, princo Konstantin
Löwenstein, konstruigis la unuan
banejon. Oni kuracadas tie korajn
kaj vejnajn malsanojn. Al tagmanĝo
ni veturis al urbo Stříbro situanta
sur la maldekstra bordo de rivero
Mže. Admiri tie eblas renesancan
urbodomon el la jaro 1543, orna-
mitan sgrafite, trinavan preĝejon de
Ĉiuj Sanktuloj, renesancajn kaj
barokstilajn domojn, gotikan ŝtonan
ponton el la jaroj 1555-1560 kun
pordego. Pluen ni veturis al proksi-
ma urbeto Kladruby kun iama bene-
diktana monaĥejo, fondita 1115
fare de la princo Vladislav la II-a,
kiu en ĉi tiea belega, monumenta

barokstila (J. B. Santini) katedralo
estas entombigita. Multajn gravajn
damaĝojn suferis la monaĥejo -
konkerita de husanoj, difektita dum
la 30-jara milito, kaj dum "social-
isma" reĝimo 1948-1990.

Tre multekoste kaj nur malrapide
eblas nun la tutan komplekson ripa-
radi. La iama prelatejo, vizitebla,
montras ekzemple bibliotekon de
iama posedanto, nobela familio
Windischgrätz (politikisto kaj milit-
estro, kiu ekz. en 1848 ordonis
pripafi Pragon per kanonegoj dum
revolucio). Signifa estas kolekto de
deponitaj tie ĉi skulpturoj el kastelo
Valeč, farita de M. B. Braun.
Hodiaŭ la tuta komplekso estas
protektita de la ŝtato.

Reveninte al Plasy ni ankoraŭ por
momento rigardis ĉe Kaznějov la
kaolinminejon. Vespere ni kunvenis
por pritaksi la renkontiĝon, kiun,
kiel jam kelkfoje, preparis kaj
planis bonege s-ano Václav Kaprál.
Sekvis prezentado de videofilmo pri
pasintjara TREP (aŭtoro K. Janík),
kantado kun s-anoj M. Smyčka kaj
V. Sládeček.

Dimanĉe matene, kun kisoj sen
larmoj, ni adiaŭis, kaj kelkaj el ni
ankoraŭ, vojaĝante tra Pilzeno,
promenis tra ĝia centro por admiru
tieajn belaĵojn.

Mirek Severa

Lančov bezonas nian helpon

Ĉijare aliĝis al Esperanto-kursoj en Lančov entute 19 geknaboj, inter ili du, kiuj pasintjare partoprenis kurson de la angla. Entute 50 geknaboj el ĉiuj tri kursoj (Esperanta, angla, germana) aliĝis kiel junaj membroj de Klubo de Theodor Kilian en Třebíč por subteni morale la organizantojn de la tendaro.




Rekonstruoj. Estas rekonstruataj necesejoj kaj lavejoj, dank‘ al financa helpo de tri iamaj tendaranoj kaj dank‘ al Fondaĵo Lančov. Tamen ankoraŭ mankas mono por fini la laborojn, precipe por la tegmento.

La nuna stato de la konstruado. La knabina parto (dekstre) jam estas finita, ĉe la knaboj estas kompleta sole la lavejo. Sur la foto oni vidas maldekstre nudajn murojn de la knabaj necesejoj kaj mankas ankoraŭ tegmento.



En la lavejoj estas novaj duŝejoj kaj lavaboj, la muroj tegitaj per belaj kaheloj.



Kio ankoraŭ necesas? La tegmento postulas kelkdek mil kro- nojn. Se ĉiu ĈEA-ano helpos per eta sumo je la konto de la Fondaĵo Lančov (**GE Money Bank a. s. 6401502-754/0600, variebla simbolo 115, konstanta simbolo 0308**), la laboroj povos esti finitaj.

Ne forgesu, ke Lančov estas nia sola Esperanto-lernejo, kiun posedas esperantistoj. Esperanto revenas en la tendaron kiel ĝia ĉefa celo.

Esperanto ĉe Universitato Masaryk

En studprogramo de Pedagogia fakultato de Universitato Masaryk en Brno estas inter elekteblaj studobjektoj *Kleriga kibernetiko*, instruata Esperantlingve. Por la ĉi-aŭtuna semestro registriĝis ĝin 18 studentoj. Kiuj ne konas Esperanton, povas lerni ĝin ĉe alia elektebla studobjekto de la Pedagogia fakultato, kiun nun registriĝis 38 studentoj de diversaj fakultatoj. Kunlaboro kun eksterlandaj universitatoj, kie estas instruata Esperanto, povus komenciĝi en 2006 en SET Lančov.

(laŭ informo de ing. J. Vojáček)

Du devigaj fremdaj lingvoj por ĉeĥaj infanoj?

La somera ĉeĥa gazetaro alportis informon, ke la ministerio de instruado intencas enkonduki en ĉeĥajn lernejojn instruadon de du fremdaj lingvoj - unu jam en la infanĝardeno, la dua ekde la tria klaso.

Esperanto - lingvo sen- aŭ ambaŭseksa?

Iam mi kantis konatan (i.a. dank' al Ŝaljamin) italtektan kanton de Beethoven, esperantigitan far Jiří Kořínek, kiu komenciĝas per la vortoj „In questa tomba obscura lasciami riposar“ - Esperante: „En tiu tombo obskura lasu, ke dormu mi“ - plue: „Quando vivevo, ingrata, dovevi a me pensar“ -

Esperante: Kiam mi vivis, sendanka, min pensi taŭgis (aŭ indis) pli.“

Kio estas rimarkinda je tiuj du paralelaj tekstoj? - Do, krom la lingva parenceco de ambaŭ tekstoj, ĝi estas la genra diverseco inter adjektivoj „ingrata“ kaj „sendanka“; dum „ingrata“ direktas nur al virina objekto (vira formo estas „ingrato“), en Esperanto la objekto povas esti vir- aŭ ineksa (se ne konsideri neŭtran genron de infanoj kaj bestoj). - Dum en la itala originalo riproĉas la mortinta viro sian vivkunulinon, en Esperanta traduko povas krom tio plendi „ŝi“ kontraŭ „li“ - aŭ en la senco de moderna toleremo **li** kontraŭ **li** aŭ **ŝi!** - La sama dilemo montriĝas, se nia ambardino Eli Urbanová konfesis: „Ĉu por la kor' amanta sufer' ekzistas plia? Se ne, nur unu granda - vin vidi, kara mia!“ - Latinida esperantisto povas mise supozi, ke la formo „kara“ rilatas al ineksa objekto de la poetino; por aliaj esperantistoj ĝi sonas ambaŭsekse (do eĉ samsekse). - Tria ekzemplo: Jaroslav Mráz tradukis la popolkanton „Vinečko bílé, jsi od mé milé“ - „Vineteto blanka, de mia kara ... - Ankaŭ tie ĉi la formo „kara“ ne kontentigis min pro la ambaŭseksa gramatika orientiĝo; tial mi ĝin retuŝis per „de l' injo kara“ kaj en la dua strofo per „de l' in' alia“ anst. „de la alia“. - La konkludo sekvas, ke la simpleco de Esperanto havas en la ambaŭseksa formo de l' adjektivoj sian - se ne Aĥilan kalkanon - do almenaŭ malfortan punkton. - Tial ni prefere uzu la substantivan formon „karulo, karulino“ k.s. anst. la formo adjektiva - por la unusenca seksa orientiĝo.

Miroslav Smyčka

POEZIA ANGULO

LET Lančov

V údolí lančovské zá-to-ry ma-lebný koutek my zná-me,
v táboře s věrnými přáteli z každým setkání máme.
(Refr.)
lančovské zátky slouč-ku se každý rok vrací-me ten loučkový
kouč hasí vla-si má každý zná tak rád ten přábný koutek má!

V údolí té naší zátoky
malebný koutek my známe,
v táboře s mladými přáteli
každý rok setkání máme.

Do údolí s loučkou
se každý rok vracíme,
tebe, koutku vlasti,
[: má z nás každý tak rád :]

SET Lančov

Rande de nia rivera val'
grundon pentrindan ni konas,
ĉiusomere en la tendar'
ĝojan renkonton ĝi donas.

En herbejan valon
ni ŝatas revenadi,
vi, patruja grundo,
[: vi estas nia am' :]

Miroslav Hlaváč
(esperantigis M. Malovec, melodion notis
M. Smyčka)



Leontodo

nenio okazis en mondo
pereis nur leontodo
traktoro per radoj multpezaj
ĝin premis al tero senbate
mi vidis paraŝuteton
ĝi longe ne falis surteren

Kompreno

Mi komprenas:
Tero estas globo,
duoble du faras kvar,
vintre estas tago plej mallonga,
estas plej varme somere.
Kiel multe mi komprenas!
Kiel malmulte mi komprenas ...

La poemoj *Leontodo* kaj *Kompreno* estas el
la poemaro de ukraino Petro Palivoda, aten-
danta publikigon.

Hundo

Kompatinda mia hundo
Mankas al mi jam de lundo
Do mi mem nun trenas ĉaron

Ne forprenis ĝin inundo
Kaptakiris ĝin hirundo
Kaj forportis ĝin trans maron

Koko

Nun rigardas ĉiu koko
kokbredejon laborloko
de centralo kokoliga

Sed ĝi estas viandstoko
en kokida mezepoko
sufreplena, pereiga.

La poemojn *Hundo* kaj *Koko* estas verkoj de
Jaroslav Krolupper

Anketa

Člen EK Mladá Boleslav a Mnichovo Hradiště Miroslav Vaněk vytvořil a rozeslal anketu o názorech na naše hnutí v České republice, jejíž výsledky hodlá zveřejnit ve Vyškově na sjezdu. Jedná se sice o soukromou akci (dotazník kontrolovali Jindra Drahotová a Josef Hradil), ale otázky jako zajímavou iniciativu zveřejňujeme. Pokud chcete odpovědět, zašlete své názory na Esperantský klub, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, vanekmi@centrum.cz.

1 Jak jste se naučil(a) esperanto?
Samouk - Korespondenční výuka -
V klubu - Jinak (uveďte jak)

2 Jste členem / členkou nějaké esperantské organizace? Doživotní -
Řadový - Sympatizant (ČES, AEH,
UEA, SAT, místní klub) - Co vás vedlo
k vystoupení z organizace? - Za jakých
podmínek byste se vrátil(a)?

3 Máte / měl(a) jste nějakou funkci?
(napište jakou)

4 Účastníte se esperantských akcí?
(jak často): Klubové schůzky - Jazykové
semináře - Konference ČES - Zahraniční
setkání

5 Jak hodnotíte práci výboru svého klubu? Kladně - Záporně - Nezájem

6 Jak hodnotíte práci sekce ČES?
Kladně - Záporně - Nezajímám se

7 Jak hodnotíte práci výboru ČES?
Kladně - Záporně - Nezajímám se

8 Jak hodnotíte práci výboru dalších organizací? (AEH - UEA - SAT)
Kladně - Záporně - Nezajímám se

9 Jste dostatečně informován(a) o dění v esperantském světě? (ČES - AEH -
Klub - E-mail - Internet - Zpravodaje -
Časopisy)

10 Jaký cíl jste si vytyčil(a) pro svou činnost v hnutí?

11 Měla vaše dosavadní činnost kladný vliv na rozšíření esperanta?

12 Jak hodnotí vaši činnost přátelé, kolegové ze zaměstnání, sousedé ap.?
Kladně - Záporně - Jinak (napište jak)

13 Uspokojuje vás dosavadní stav fungování a prezentace těchto esperantských organizací? Ano - Ne -
Neumím odpovědět (ČES, AEH, UEA,
SAT, místní klub)

14 Co brání vašemu dalšímu rozvoji v hnutí?

15 Co jste chtěl(a) / chcete udělat, ale dosud jste nemohl(a) udělat pro hnutí?

16 Pomohla vám znalost esperanta mimo hnutí?

17 Navštěvujete se také s jinými esperantisty mimo organizované akce?

18 Podporujete zavedení univerzálního jazyka jako jednacímho jazyka EU?

19 Proč myslíte, že veřejnost vnímá esperanto negativně, případně tento jazyk vůbec nezná?

20 Jak by podle vás měla vypadat osvěta?

21 Doporučil(a) jste za poslední rok někomu studium esperanta nebo přijetí členství ve svém klubu? (při
Ano napište, zda přijal)

22 Vážíme si soukromých aktivit propagujících esperanto. Měly by být ale zastřešeny svazem. Souhlasíte? Proč?

23 V rámci emancipace, unifikace, globalizace a simplizace navrhněte neologismus: jedno společné slovo pro li a ŝi. Uveďte, proč si myslíte, že toto nové slovo je nebo není pro současnou dobu potřebné.

Jiří Patera - 70-jara

Honora membro de ĈEA estas multjara esperantisto, unue membro de la klubo en Most, poste multajn jarojn en la Esperantista Klubo en Praha, kie li funkciis ankaŭ kiel prezidanto. Lia merito estas, ke regule aperadas Bulteno de la Praga klubo. Kelke da jaroj li estis ankaŭ membro de la komitato de ĈEA. Dek jarojn li redaktis la asocian revuon "Starto". Jiří Patera estas tre aktiva sur la kampo literatura. Liaj artikoloj ofte aperas en Monato kaj aliaj gazetoj. Duono de rakontoj el la libro "Ne nur soldato Ŝvejk" estas lia traduka laboro, aliaj liaj tradukoj el Hašek aperis en Bulteno. Tie la legantoj povis legi ankaŭ liajn tradukojn el la fabeloj de Božena Němcová kaj Zdenka Bergrová.

Esperanta retejo de Moravské Budějovice

Moravské Budějovice havas nun sian oficialan retejon ankaŭ en Esperanta versio: http://www.mbudejovice.cz/html/es_historie.htm. La sukceso estas merito de s-ano Viktor Dvořák el tiu urbo, la tekston esperantigis Zdeněk Hršel el Brno.



Viena Esperanto-muzeo

Por la Esperanto-muzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj komenciĝos nova fazo. Ni transloĝiĝos en la sekvaj semajnoj al pli taŭga kaj multe pli facile alirebla loko. Temas pri nove restaŭrita palaco en la centro de Vieno, tute proksime de la nuna situo. Jen ĝia adreso:

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Vieno, Aŭstrio

Ni ankaŭ havos novajn deĵorajn horojn, kiuj validos nur ekde la remalfermo en novembro:

Esperantomuzeo: lun. – merkr., vendr. – sab. 10h – 14h, ĵaŭde 15h – 19h.

Kolekto por Planlingvoj: lun. – merkr., vendr. 9h – 16h, ĵaŭde 12h – 19h.

Sed bonvolu direkti ĉiujn sendaĵojn al la sekva adreso:

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Josefsplatz 1, 1010 Vieno, Aŭstrio

Kongreso KELI 2006

Na letošním ekumenickém kongrese v Maďarsku rozhodl mezinárodní výbor KELI (Kristana E-Ligo Internacia), že se příští, již 56. kongres KELI uskuteční opět v České republice a to ve dnech 12. - 19. srpna 2006 ve Strážném u Vrchlabí. Bližší informace a přihlášky Vám zašle Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651.

cea.polnicky@quick.cz

Infanoj en Pollando

En majo polaj infanoj de Verda Arbeto el Rybnik venis vizite al Česká Třebová (la instruistino Teresa Konsek instruas Esperanton kiel devigan studobjekton), en junio male ĉeĥaj infanoj de Amikeco el Česká Třebová venis al Rybnik, kie ili loĝis en polaj familioj.

Sabate per mikrobuso ĉiuj veturis al Pszczyna, kie ili vidis muzeon kun spegula salono kaj presejon el la 18-a jc., poste al Skoczow (kapelo de J. Sarkan-der). Dimanĉe en Rybnik sekvis infana meso, ĉevalbredejo, baziliko, urbodomo, naĝado en tegmentita naĝejo, festivalo de blov-orkestroj, rostado de kolbasoj ĉe fajro en ĝardeno. Lunde post trarigardo de lernejo (komputila klasĉambro kaj lerneja muzeo de Silezio) busa forveturo hejmen. -zn-

Semajno en Beskydy

Aŭguste (13-20.8.2005) mi partoprenis kiel gasto rekapabligan restadon de blindula filio de SONS el Olomouc (ducent membroj), kiu ankaŭ subtenas blindajn esperantistojn. Gvidantoj de blinduloj konkursis pri orientado (kun tuko-kovritaj okuloj), sed plej interesa estis ekzercado de tridek belaj hundoj, kiuj alportadis al siaj mastroj bastonojn. Sur la bastonaj ekstremoj estis ligitaj cervelasoj, kiujn la hundoj estis ricevontaj post alporto, sed multaj unue formangis ilin kaj nur poste alportis la bastonon.

La blinduloj diris, ke la homoj nun kondukas al ili pli afable, eble sub influo de klerigaj programoj en televido kaj radio.

Jarmila Rýznarová

InPaSem 2005

INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO 2005 okazos de la 10-a ĝis la 16-a de oktobro 2005 en la urbeto Dobřichovice apud Prago. Dum la semajno paralele okazos la kurso por komencintoj kaj la seminario por jamaj parolantoj. Pli da informoj kaj aliĝilojn vi povas peti ĉe info@kava-pech.cz, eventuale vi povas aliĝi rekte ĉe:

<http://www.kava-pech.cz/inpasem>.

aŭ je la adreso: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice.

26-a Ĉeĥa-Saksa Tago (ĈESAT)

realiĝos la 9-an de oktobro 2005 en Kastelo Ditterbach. Aliĝojn akceptas Norbert Karbe, Dr-Otto-Nuschke-Str. 12, 01796 Pirna, Germanio.

EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

estos la 26-an de septembro 2005. Ĉi-okaze aperos en la ĵurnalo **PRÁVO** la tutpaĝa komerca anonco sub la titolo "Proč jsem vynalezl Walking Bag?" (*Kial mi inventis Walking Bag?*)

Ĝin mendis kaj pagos japana entreprenisto Etsuo Miyosi. La anonco propagandos la inventaĵon faritan de s-ro Miyoshi por handikapitoj, sed fakte multe pli da spaco ĝi dediĉas al la propagando de Esperanto. Ĝi estos konvena helpilo por ĉiuj, kiuj volas propagandi Esperanton en Ĉeĥio.

(laŭ ĈEA-retkomunikoj 2/2005)

Ni kondolencas

- La 13-an de marto 2005 forpasis **Anna Slavíková** el Brno, kiu kun sia edzo Ing. Vladimír Slavík, CSc., forpasinta 1997, daŭrigis poresperantan laboron de Ing. Antonín Slavík, direktoro de Radio-journal Brno, kiun ekzekutis nazioj.

- La 25-an de junio 2005 neatendite forpasis **Libor Mikulášek** el Ústí nad Labem en aĝo de 32 jaroj.

- La 16-an de julio 2005 forlasis niajn vicojn por ĉiam s-anino **Františka Víšková** el Břežany apud Týnec n. S., konata ĉefe en fervojista sekcio. Ŝi, ĉiam afabla, sincera kaj honora, kunfondantino de nia E-klubo restos por ĉiam en niaj rememoroj.

Václav Stibůrek, EK Benešov

- **Marta Lorková** el Brno, multjara kluba estraranino, forpasis post preskaŭ unujara hospitaligo la 23-an de julio 2005.

- La 2-an de aŭgusto 2005 mortis longjara membro de EK Opava **Štěpán Turčíněk** en la aĝo de 75 jaroj. Naskiĝinta en suda Moravio, li laboris en la silezia urbo Vítkov kiel dezajnistoj en la fabriko Hedva. En tiu tempo li projektis kelkajn Esperanto-motivajn tekstilajn suvenirojn, kiuj pro manko de financoj en la movado ne realiĝis. Post pensiigo li transloĝiĝis al Opava. Tie li dediĉis sin al pentroarto, siajn bildojn de silezia pejzaĝo li ankaŭ ekspoziciis. Pere de Esperanto li kolektis riĉan, kelkfoje ekspoziciatan kolektaĵon de bildkartoj el la tuta mondo.

-vk-

Fernando de Diego

(1919-2005)

Nokte de la 30-a de junio al la 1-a de julio 2005 mortis en Zaragoza, Hispanio, la honora membro de UEA, eminenta tradukisto, **Fernando de Diego**.

Fernando de Diego de la Rosa naskiĝis la 2-an de novembro 1919. En li la Esperanta mondo perdis unu el siaj plej brilaj kaj fekundaj beletristoj.

Inter liaj pli ol 20 tradukvolumoj troviĝas i.a. **Cigana romancaro** de Lorca (1971), **La arbo de sciado** de Pío Baroja (1973), **Doña Bárbara** de Gallegos (1975), **La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha** de Cervantes (1977), **D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde** de Stevenson (1985), **La familio de Pascual Duarte** de Cela (1985), **Norda odiseado** de Jack London (1989), **Drolaj rakontoj** de Balzac (1989), **Cent jaroj de soleco** de García Márquez (1992) kaj **La oldulo kaj la maro** de Hemingway (1996).

Tre valoraj estas liaj studoj **Pri Esperanta tradukarto** (1979) kaj **Pri literatura kritiko** (1984).

En 2003 aperis lia **granda Esperanta-hispana vortaro**.

En la UK en Valencio, 1993, Fernando de Diego estis elektita kiel honora membro de UEA.

Lionel Elvin (1905-2005)

La 14-an de junio 2005, du monatojn antaŭ sia 100-jariĝo, mortis en Kembriĝo la honora patrono de UEA L. Elvin.

KALENDARO 2005

9.10. Ĉeĥa-Saksa tago

10.-16.10. Internacia Paroliga Semajno

21.-23. 10. ĈEA-kongreso, Vyškov

5. 11. Renkontiĝo en Polička

7.-13. 11. Seminario Skokovy

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte tiskopis VKLAD, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825, **variabilní symbol**: má celkem 10 kolonek - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (je uvedeno na adresním štítku při expedici Starta) a dalších pět pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte svoje číslo legitimace a pošlete tajemníkovi seznam, za koho platíte. **Symbol konstantní** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku. **Na starý účet u KB již nic neplatíte!!!**

Seznam čísel (variabilní symboly):

06940 členství ČES

06941 členství UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

06944 zápisné do Odborné knihovny ČES

07001 předpl. Monats (650,- Kč)

07002 předpl. La Gazeto (650,- Kč)

07003 předpl. La Ondo de Esp-o (500,- Kč)

07004 předpl. Juna Amiko (300,- Kč)

07005 předpl. Literatura Foiro (970,- Kč)

07006 předpl. Heroldo de Esp-o (1030,- Kč)

07007 předpl. Femina (650,- Kč)

07008 předpl. Litova stelo (320,- Kč)

50200 sekce železničářů IFEF

50400 komise pedagogická ILEI

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE

51200 sekce informatiky

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Zájemci o časopisy,

pište na adresu nového peranta: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Způsob placení najdete v levém sloupci této strany.

Monato: 650,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

La Gazeto: 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 500,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

Juna Amiko: 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Litova stelo: 320,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

Literatura Foiro: 970,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5

Heroldo de Esperanto: 1030,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

Femina: 650,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Nové knihy KAVA-PECH:

Taglibro de mia frato (Taglibro de Petr Ginz en traduko de Vlastimil kaj Věra Novobilský, 160 p.)

Simpozio pri interkultura komunikado (Prelegoj de simpozio, Christer Kiselman, 160 p.)

Esperantologio, n-ro 3 / EES 3 (Christer Kiselman, 68 p., prelegoj pri esperantologio)

Zamenhofova ulice (Roman Dobrzyński, z esperanta přel. Jirí Patera, 264 str., rozhovory o hnutí.)

Celostní medicína a Saamova akupunktura. Klasická korejská medicína. (Puramo Chong, z esperanta přel. Zdeněk Pluhař, 312 stran)

Periodikum Českého esperantského svazu (36. ročník)

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz;

<http://members.chello.cz/malovec/>

Členská evidence a změny adres:

**c/o Pavel Polnický, ČES, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325
615 651, cea.polnický@quick.cz**

Uzávěrka dalšího čísla: 15.11.2005

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(36-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.11.2005**

ISSN 1212-009X

Al la programo de ĈEA- kongreso en Vyškov

Vendrede la 21-an de oktobro je la 17-a horo okazos inaŭguro de ekspozicio de E-libroj en la biblioteko de Karel Dvořáček. Ĝi situas dekstre post subirejo (kontraŭ la preĝejo). Se eblos, venu tiel, ke vi povu ĝin partopreni. Pro funkciado de la biblioteko ĝi ne povas okazi en alia tempo.

Vizito el Rennes

Junulino kaj tri junuloj (27-30-jaraj) el la Bretona Rennes vizitis aŭguste (10-12.8.2005) E-klubon de sia ĝemelurbo Brno. Akompanataj de lokaj klubanoj ili ekskursis al la abismo Macoĥa kaj tra-rigardis la urbon. En vespera amika babilado kun trinko kaj kanto estis preparolata kunlaboro de ĝemelurbaj esperantistoj.

Setkání v Poličce

bude 5.11.2005. Na programu je návštěva lisovny plastů a beseda s maratónským veteránem panem Havranem. Sraz účastníků je u příjezdu vlaků v 10:10 hodin.